

**32-a Jarkolekto \* Junio 2018 \* N-ro 109**



**HIGUERA DE LA SIERRA**  
kaŝas sin meze de senfina arbaro

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.

Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto**.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto

REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)

DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.

IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ

REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ

COLABORADORES: Alejandro BURGOS ESCALANTE

Vicente HERRERA COBO

Carlos SPINOLA

## ENHAVO

Esperanto en Andaluzio .....	3
Tri Esperanto-Kongresoj okazontaj en Malago Majo 2019 .....	7
Italaj Vakeraj Filmoj en Almerio .....	9
Lingva Angulo: “La Vorto Ke” .....	13
Poezia Angulo .....	18
Turismi en “ <i>Higuera de la Sierra</i> ” .....	21
Paĝoj pri Nia Historio .....	25
Nova Revuo: “ <i>VENTO</i> ” .....	30
Flamenko: “ <i>La Rumbo</i> ” .....	31
Misteroj kaj legendoj de Andaluzio .....	33
Krucvortenigmo kaj Rebuso .....	35
Humuro .....	38

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.



## ESPERANTO EN ANDALUZIO



### Esperanto en Granada Lernejo.-

La 18-an de aprilo okazis informa agado pri internacia komunikado, lingva situacio en Eŭropa Unio kaj Esperanto en la lernejo “Sagrado Corazón” en la urbo Maracena, granada provinco. La instruisto David Rodríguez, ne E-parolanto, kontaktis la grupon de esperanto en Granado (<http://esperantoengranada.blogspot.com/>) por esplori la eblon organizi tiun eventon kaj, post diversaj koplodoj, nia kolego Juan Diego Díaz respondeciĝis pri ĝi, kiel antaŭa membro de tiu grupo en Granado, tiama reprezentanto de la agado en la Universitato de Sevilo kaj, ĝenerale, de la andaluzia movado.



Partoprenis ĉirkaŭ 285 homoj: studentoj de 11 ĝis 16 jaroj (laŭ la hispana eduk-sistemo gelernantoj de la 6-a kurso de la Unua Instruado ĝis la 4-a kurso de la Deviga Sekundara Edukado, kune kun

la instruistoj de la lernejo kaj du francaj instruistinoj vizitantaj la lernejon kadre de la Erasmus+ projekto. La sesioj okazis de la 8-a ĝis la 13:30 horoj; entute 5 grupoj po horo plus 30 minutoj por lerno-paŭzo.

La enhavo baziĝis sur konstanta interago inter la studentoj kaj la prezentanto, por tio ke ĝi ne estu unuflanka prezentado de la informo sed kiel eble plej alloga. Ĉiumomente la studentaro partoprenis per respondoj al demandoj pri la internacia komunika problemoj, la situacio en Eŭropa Unio, la lernado de lingvoj kaj, poste, dum la prezento de la lingvo mem per specifaj ekzemploj por kapabligi ilin krei siajn unuajn bazajn kaj, por ili, allogajn frazojn kiuj povus esti uzataj inter la amikoj; salutovortoj, *mia nomo estas...*, *mi/vi estas bela...* kaj la uzo de mal-, *mi ŝatas vin*, inter aliaj.

La sesio kun ĉiu grupo finiĝis per la videokanto “Dek bovinoj”, kaj en la publiko estas rimarkinda, ke la plejmulto kun-kantis la tekston je la lasta parto de la kanto.

Konklude, la taksado de la taga sperto estas bonega. Sendube, la disvastigo pri la internacia komunikad-situacio estas natura aliro por la E-movado.

### **Prelegoj pri elstaraj esperantistoj en Kordovo.-**

Organizata de la Kordova Urbodomo, pere de la Municipa Arĥivo, okazis en Kordovo de la 31-a de oktobro ĝis la 4-a de decembro 2018, serio da prelegoj sub la titolo “La Respublika Kordovo”, kies celo estis diskonigi kelkajn elstarajn kordovanojn kiuj agadis politike, kulture aŭ profesie, en ĉi tiu andaluzia urbo dum la Hispana Respubliko (1931-1936).

Tiel, la 21-an de novembro la kordova historiisto Manuel García Pardoy prelegis pri “*Francisco Azorín Izquierdo, arquitecto, esperantista, masón y socialista*”. Jesja, la esperantista agado de nia elstara samideano Francisco Azorín estis unu el la ĉefaj kernoj en la prelego de la D-ro García Parody. Dum la prelego, li menciis la librojn de nia samideano, la konstantan propagandon favore al la internacia

lingvo plenumita en Kordovo kaj ankaŭ liajn agadojn por Esperanto dum la meksika ekzilio.



D-ro García Parody ekprelegas pri Francisco Azorín Izquierdo

La 28-an de novembro la ĵurnalistino kaj verkistino Matilde Cabello prelegis pri “Pilar Sarasola y Rogelio Luque. La empresaria y el librero” (*Pilar Sarasola kaj Rogelio Luque. La entreprenistino kaj la libro-vendisto*). Dum la parolado Matilde Cabello menciis la fakton, ke Rogelio Luque estis aktiva propagandisto de la lingvo Esperanto, li eĉ estis delegito de Universala Esperanto-Asocio en Kordovo kaj kune kun sia edzino, Pilar Sarasola, li partoprenis en la Esperanto-Kongreso organizata en Kordovo en la jaro 1925.

Fine, ankaŭ okazis prelegoj pri aliaj elstaraj tiutempaj esperantistoj, kiel D-ro Manuel Ruiz Maya aŭ la instruisto kaj ministro dum la Hispana Respubliko Eloy Vaquero, tamen oni ne menciis ilian esperantistecon dum la prelegoj.

### Andaluzaj gelernantoj en la UNED-kurso pri Esperanto.-

Sur pasinta numero de nia revuo ni diskonigis, kaj eĉ abunde propagandis, pri la organizado de kurso de esperanto en la hispana universitato UNED, nivelo A2. Por tiuj ne-konantaj tiun Universitaton, ni diru, ke temas pri la unua alt-nivela lernejo kiu ebligis la instruadon per ne-ĉeestanta edukado. Do, dum multaj jaroj ĝi reprezentis la solan eblon atingi universitatan diplomon por tiuj kiuj loĝis en urbo kie ne sidejis universitato.

Nun, la lingv-instrua departemento de la universitato UNED okazigas kurson de la internacia lingvo esperanto. Entute aliĝis 59 homoj el kiuj 11 estas andaluzoj, laŭ la jena deveno:

Alheciro (Kadizo)	1
Almerio	1
Kadizo	1
Kordovo	2
Malago	1
Motriilo (Granado)	3
Ubedo (Jaeno)	2

Ni kuraĝigas ĉiujn gelernantojn fini la kurson kaj superi sukcese la ekzamenon venontjare.



## Tri Esperanto-Kongresoj okazontaj en Malago ~ Majo 2019

Verŝajne dum la venonta monato majo la urbo Malago estos la ĉefurbo de Esperantio (la Esperantista Komunumo). En Malago okazos de la 1-a ĝis la 9-a de majo 3 kongresoj kie la internacia lingvo ĉefrolas. Temas pri:

- 71-a Kongreso de Internacia Fervoja Esperanto-Federacio.
- 78-a Hispana Kongreso de Esperanto.
- 21-a Andaluzia Kongreso de Esperanto.

Estas tre interesa la fakto, ke la Organiza Komitato metas je la dispono de ĉiuj interesitoj la eblon loĝi kaj manĝi dum la kongresoj en la propra kongresejo, Dioceza Domo ĉe la strato Pasaje de los Almendares 2-4 de Malago. Se al Vi interesas ĉi tiu eblo, bv. kontakti kun la Organiza Komitato de la Kongreso, kiu ankaŭ povos informi al Vi pri aliaj restad-eblecoj.

Dum la kongresoj oni planis organizi ekskursojn al diversaj apudaj urboj kaj vilaĝoj, pri kiuj ni informas al Vi en la apuda provizora programo de la kongresoj:

Ne hezitu veni en Malagon !!! Kontakto: [angelarquillos@gmail.com](mailto:angelarquillos@gmail.com)

Pli detalaj informoj ĉe: [www.esperanto-andalucia.info](http://www.esperanto-andalucia.info)



## PROVIZORA PROGRAMO MALAGO MAJO 2019

Merkredo 01.05	10.00 -	Akceptado / Informado: <i>alvena tago por HEF</i> HEF - distra programo, <i>prelegoj</i>
Ĵaŭdo 02.05	08.00 -	HEF - turisma programo: <b>T3 – Granado, Alhambro</b> <i>Prelegoj: kongresa temo: "Lingva situacio en Eŭropo"</i>
Vendredo 03.05	09.00 - 10.30 - 13.00  15.30 - 19.30 20.00 - 21.00 21.00 - 23.00	<i>Akceptado / Informado: alvena tago por IFEF</i> <i>Projekto Erasmus+ "Esperanto-Komuniko"</i> Akceptado kaj prezento de la Kongreso al la gelertantoj Ateliero <i>Tagmanĝa paŭzo</i> <i>Prelegoj,</i> Kunveno de la IFEF Estraro kaj LKK <b>Vivu la Teatro!</b> , (M.G.Aduriz, M.Fernández, kiel gvidantoj)
Sabato 04.05	08.00 - 10.00 09.00 - 10.00 <b>10.00 - 11.30</b> 11.30 - 12.00 12.00 - 13.15  15.30 - 19.30  21.00 - 23.00	<i>Akceptado/Informado</i> Prelego pri la urbo, regiono, <b>Solena Malfermo (komuna: IFEF, HEF, AEU)</b> <i>Komuna foto; Gazetara konferenco</i> <i>"Mia liriko kaj muziko", (M. Fernández)</i> <i>Tagmanĝa paŭzo</i> Urbovizitado <b>V1 - Malago</b> (piedire kaj per urba buso) <i>Vespermanĝo</i> <b>Nacia vespero: "Flamenco"</b>
Dimanĉo 05.05	<b>09.00 - 10.00</b> <b>10.00 - 13.00</b>  10.00 - 13.00 10.00 - 13.00 12.30 - 13.00  15.00 - 18.00 18.00 - 19.00  21.00 - 23.00	Venonta kongreso IFEF sinprezentas IFEF - Nepublika komitatkunsido HEF - Ĝenerala kunsido E-kursoj por komencantoj, -intoj Urbovizitado <b>V2 - Malago</b> , botanika ĝardeno (per urba buso) <b>Oficiala fermo de Hispana kaj Andaluza kongresoj</b> <i>Tagmanĝa paŭzo</i> Kunsido de la Faka Komisiono de IFEF Veturado tra la interplaneda spaco - (Carlos Spínola) <i>vespermanĝo</i> Distra kaj arta programo
Lundo 06.05	<b>09.30 - 12.30</b> 09.30 - 12.30  13.00 - 14.30 14.30 - 19.30  21.00 - 23.00	<b>Plenkunsido IFEF</b> E-kursoj por komencantoj; -intoj Prelegoj <i>Tagmanĝa paŭzo</i> Duontaga ekskurso <b>D1 – Zafarraya</b> , Laŭ la spuroj de antikva trajno; Duontaga ekskurso <b>D2 – Antequera</b> <i>vespermanĝo</i> Kultura, kaj arta vespero
Mardo 07.05	<b>09.30 - 12.30</b> 09.30 - 12.30  <b>15.00 - 17.00</b> 17.00 - 18.00 18.00 - 19.00  20.30 - 21.30 -	<b>Ĉefa fakprelego kaj aliaj prelegoj; 110a Jariĝo de IFEF</b> E-kursoj por komencantoj; -intoj <i>Tagmanĝo</i> Movadaj aferoj; Kunsido de la laborgrupoj, publika Ateliero pri arkivado - Manlibro de Jan Niemann Ateliero pri informadiko (kiel krei Vikipedian paĝon) - Laurent Vignaud <i>vespermanĝo</i> Distra kaj arta vespero Kunveno de la IFEF estraro kaj LKK ; <b>Estrarkunsido de IFEF</b>
Merkredo 08.05	09.30 - 19.30  <b>21.00 - 22.00</b> 22.00 -	<b>T1 - Trajna ekskurso al Ronda</b> ; kun tagmanĝo (pikniko) <i>vespermanĝo</i> <b>Solena fermo</b> Ĝisrevida vespero
Ĵaŭdo 09.05	08.00 -	<b>T2 - Tuttaga ekskurso al Kordovo</b> kaj ĝia Moskeo
Vendredo 10.05		Rehejmenigo aŭ <b>postkongreso</b>



## ITALAJ VAKERAJ FILMOJ EN ALMERIO

La italaj vakeraj filmoj, ankaŭ konataj laŭ la anglaj vortoj “*spaghetti western*”, estas subĝenro de la vakeraj usonaj filmoj, ili populariĝis dum la 60-aj kaj 70-aj jaroj de la pasinta jarcento.

La nomo “italaj vakeraj filmoj” devenas de la fakto, ke preskaŭ ĉiuj ili estis produktataj de italaj aŭ hispanaj filmo-kompanioj, foje de kunproduktadoj de ambaŭ landoj kaj eĉ de Germanio. Kun la celo malpliigi la kostojn de la filmo oni elektis por la filmado naturajn scenejojn de Andaluzio, konkrete ĉe la dezerto Tabernas en Almerio.



Clint Eastwood en  
*La bonulo, la malbelulo kaj la malbonulo.*

Malgraŭ la fakto, ke oni realigis ĉi tiujn filmojn per malalta buĝeto, kelkaj el ili atingis grandan sukceson kaj eĉ konsiderataj kiel majstraj verkoj, ekz. “*La bonulo, la malbelulo kaj la malbonulo*”, reĝisorita de la itala Sergio Leone en la jaro 1966 kaj filmita, inter aliaj scenejoj, en Almerio.

Ĉefa karakterizo de ĉi tiuj filmoj ankaŭ estis la ekzisto de malpuraj etosoj kie loĝas kaj fi-agas krudaj roluloj al kiuj mankis ia moralo kaj etiko kun ĉefa celo: la atingo de mono. Same, en ĉi tiaj filmoj la morto kaj la perforto estas abundaj, tamen se vidataj per nuntempaj okuloj ĉi tiuj violentaj scenoj estas preskaŭ infanecaj, ĉefe pro la fakto, ke en la italaj vakeraj filmoj ne aperas sangaj scenoj.

Kiel dirite, ĉi tiujn filmojn oni produktis per malalta buĝeto, tamen ili estis la filmoj kie komencis siajn karierojn tiuj kiuj poste estus *stelaj* aktoroj en Holivud'. Tiel, en unu el ĉi tiaj filmoj aperis unuafoje Clint Eastwood. La sonbendo de tiuj filmoj ankaŭ estas grava elemento, ĉefe ĉar la muziko ofte montras kaj markas la plej gravajn scenojn dum la filmo. Tre fama sonbendo estas tiu de *“La bonulo, la malbelulo kaj la malbonulo”*, kies ĉefa aŭtoro estis la itala Ennio Morricone.



*Ne, ne temas pri Dodge City, sed pri Tabernas en Almerio.*

Inter la plej konata italaj vakeraj filmoj estas *“Kontraŭ malmultaj dolaroj”* (1965), la jam menciita *“La bonulo, la malbelulo kaj la malbonulo”* (1966) kaj *“Iam en la Uesto”* (1968). La ĉefrolulo de ĉi tiu lasta filmo estis la konata holivuda aktoro Charles Bronson.

Rilate Andaluzion, oni devas elstari la fakton, ke preskaŭ ĉiuj scenoj filmitaj ĉe naturaj scenejoj en ĉi tiuj italaj vakeraj filmoj okazis en la dezerto Tabernas en Almerio, kun la celo imiti la pejzaĝojn de la Uesto de Usono aŭ de la Nordo de Meksikio, kie ofte okazis la uestaj aventuroj. Ankoraŭ restas en Almerio, tre bone konservitaj, konstruaĵoj starigitaj okaze de la produktado de tiuj vakeraj filmoj, la domoj, trinkejoj, milit-fortresoj, ktp, estas tute similaj al tiuj ekzistantaj en la okcidento de Usono fine de la 19-a jarcento.

Ĉi tiu lokoj en Almerio estas hodiaŭ viziteblaj kaj dum ĝi oni povas ĉeesti spektaklojn kie rolas rabistoj, viski-trinkantoj, marŝaloj, soldatoj, kantistinoj kaj kompreneble ankaŭ tiu pian-ludisto kiu ne ĉesas ludi la muzikilon eĉ meze de pafado.



Ofta Uesta sceno prezentita en Almerio

Meze de la 70-aj jaroj la sukceso, do la produktado, de la italaj vakeraĵoj filmoj malpliigis. Eble la lastaj kiuj ricevis amason da spektantoj estis tiuj kies ĉefroluloj estis la italaj Bud Spencer, kies vera nomo estis Carlo Pedersoli, kaj Terence Hill, kiu reale nomiĝis Mario Girotti.

Malgraŭ tio, de tempo al tempo, novaj filmoj alvenis en la almerian dezerton kaj ne nur por paroli pri vakeroj, indiĝenoj kaj usonaj soldatoj, kiuj ankoraŭ restas en la memoroj de ĉiuj ni.



*Amu vian landon: konu ĝian historion !*



**ALIĜU AL**  
***Andaluzia Esperanto-Unuiĝo***

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: [esperanto14@ono.com](mailto:esperanto14@ono.com)  
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe la jena konto:

- Banco BMN (eksa Caja General de Ahorros de Granada)  
ES80 0487 3225 1420 0000 6979

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2019

**HAZTE SOCIO DE LA**  
***Asociación Andaluza de Esperanto***

Si deseas colaborar en la difusión de la lengua internacional en Andalucía, ésta es tu asociación

Para hacerte socio contacta con: [esperanto14@ono.com](mailto:esperanto14@ono.com)  
Cuota anual: 20 € que se deben abonar en la siguiente cuenta:

- Banco BMN (antigua Caja General de Ahorros de Granada)  
ES80 0487 3225 1420 0000 6979

Cuando pagues por favor informa de los siguientes datos:

- Nombre del nuevo socio.
- Concepto: Cuota 2019

## Lingva Angulo

### LA VORTO “KE”



clipartof.com/1233388

Kiam hispan-lingvano komencas lerni esperanton frape aperas evidentaĵo: la hispana vorto *QUE* en esperanto estas eĉ pli facile lernebla, ĉar ĝi uzas nur la du literojn prononcatajn en la hispana lingvo. Do, la hispana *QUE* estas la esperanta *KE*.

Tamen, la afero ne estas tiel simpla, ĉar ne ĉiam la hispana *QUE* povas esti tradukita en esperanto kiel “KE”. Ni vidu kelkajn ekzemplojn pri la hispan-lingva *QUE* kaj ni komprenos kiamaniere uzi ĝin ĝuste en esperanto.

- Se ni parolas pri komparoj: *QUE* = OL

*El idioma italiano es más fácil que el chino.*  
La itala lingvo estas pli facila ol la ĉina.

- Se aperas frazo+subfrazo: *QUE* = KE

*Yo opino que tú eres inteligente*  
Mi opinias, ke vi estas inteligenta.

Ni vidas, ke ĉi tie aperas du frazoj, unu ĉefa: *mi opinias*, kaj alia subfrazo: tio kion oni opinias, *ke vi estas inteligenta*. Estas normale meti komon (,) inter ambaŭ frazoj kaj ĝuste antaŭ “ke”. Ni vidu pliajn ekzemplojn pri ĉi tiu “ke”:

*El meteorólogo afirmó que mañana lloverá.*  
La meteologo asertis, ke morgaŭ pluvos.

*No creo que tu amigo sea capaz de aprobar el examen.*  
Mi ne kredas, ke via amiko estos kapabla aprobi la ekzamenon.

*Veo que no fuiste ayer a la biblioteca.*  
Mi vidas, ke vi ne iris hieraŭ en la bibliotekon.

- Se oni volas traduki *EL CUAL / LA CUAL* = KIU(n)

Kiam en la hispana lingvo ni uzas *QUE* kun la signifo “*el cual / la cual*”, tiam ni devas uzi la esperantan “KIU” kaj se ĝi agas kiel rekta objekto ni uzos la akuzativan formon “KIUN”.

*Aquí está el libro que compré ayer en la librería.*  
(*el cual*)

Jen la libro kiun mi aĉetis hieraŭ en la libro-vendejo.

*El profesor que enseña ciencias naturales es muy inteligente.*  
(*el cual*)

La profesoro kiu instruas naturajn sciencojn estas tre inteligenta

Ni vidas, ke “KIU” en la subfrazo povas esti subjekto aŭ rekta objekto. Se ĝi estas objekto ni devas uzi la akuzativan formon (-n). Laŭ la ekzemplo ĵus vidita: *Jen la libro, kiun mi aĉetis....mi aĉetis la libron* (kiun). Sur la dua ekzemplo: *La profesoro, kiu instruas naturajn sciencojn.....kiu estas la subjekto en la frazo “kiu instruas naturajn sciencojn”*, do ĝi ne aperas laŭ akuzativa formo.

Ni vidu pliajn ekzemplojn pri ĉi tiu *EL CUAL/LA CUAL* = KIU

*El artículo del que habló tu padre es muy interesante.*  
La artikolo pri kiu parolis via patro estas tre interesa.

*La medicina que compraste en la farmacia es muy útil.*  
La medikamento kiun vi aĉetis en la apoteko estas tre utila.

*El ordenador que se estropeó valía más de mil euros.*  
La komputero kiu paneis kostis pli ol mil eŭroj.

*El coche que has comprado es demasiado rápido.*  
La aŭtomobilo kiun vi aĉetis estas tro rapida.

- *QUE* en demando = KIO.

Se temas pri la demando: *¿Qué es....?* Tiam ni uzos “KIO” aŭ “KION” se temas pri objekto. Ĝenerale se la verbo uzata estas “*esti*” (ser, estar, haber) tiam ni uzos KIO, ankaŭ se ni metas prepozicion antaŭ “kio” kaj por aliaj transitivaj verboj KION.

*¿Qué es eso?*  
Kio estas tio?

*¿Qué hay en el interior de la caja?*  
Kio estas ene de la sktalolo?

*¿Sobre qué trata el libro?*  
Pri kio temas la libro?

*¿Qué estudias?*                      *¿Qué has dicho?*  
Kion vi studas?                      Kion vi diris?

*¿Qué piensas del nuevo profesor?*  
Kion vi pensas pri la nova profesoro?

*¿Sobre qué está suspendida la piedra?*  
*Sur kio pendumas la ŝtono?*

*¿Qué opinas de lo sucedido?*  
Kion vi opinias pri la okazintaĵo?

- *QUE* rilata al tempo: KIAM.

*El día que vengas a mi casa te invitaré a comer.*

*(cuando)*

La tago kiam vi venos ĉe mi, mi invitos al vi por manĝi.

*Te quedarás en tu cuarto hasta que comprendas la lección.*

*(cuando)*

Vi restos en via ĉambro ĝis kiam vi komprenos la lecionon.

Atentu, por tio kio okazos estontece ni uzos os-tempon.

- *QUE* rilata al kvanto: KIOM DA.

Kelkfoje ni uzas *QUE* por paroli pri kvanto da aĵoj.

*¡Qué de coches había el fin de semana en la carretera!*

Kiom da aŭtomobiloj estis en la auto-ŝoseo dum la semajna-fino!

*¡Qué de problemas he encontrado!*

Kiom da problemoj mi trovis!

Konklude, kvankam la hispan-lingva vorto *QUE* povas ŝajni tre facile tradukebla per la esperanta “KE” memoru, ke ne ĉiam ĉi tiu estas la plej taŭga traduko kaj kiel ofte dirite, NENIAM traduku rekte el la hispana en esperanton.

Ni proponas al vi kelkajn ekzercojn pri la vorto KE. Uzu la plej taŭga laŭ la antaŭaj klarigoj:

La nova profesoro estas pli afabla \_\_\_\_\_ la ĵus emerita.

*El nuevo profesor es más agradable que el recién jubilado.*

\_\_\_\_\_ da paĝoj havas la libro \_\_\_\_\_ mi devas legi !

*¡Qué de páginas tiene el libro que debo leer!*



*La tago \_\_\_\_\_ pluvos, tutcerte vi forgesos la parapluvon.*  
El día en que llueva, seguro que olvidarás el paraguas.

*Mi dubas, \_\_\_\_\_ via patrino povos veni ĝustatempe en la renkontiĝon.*  
Dudo que tu madre pueda venir a tiempo a la reunión.

*La amiko pri \_\_\_\_\_ mi parolis al vi estas pli inteligenta \_\_\_\_\_ mi.*  
El amigo del que te hablé es más inteligente que yo.

La nova profesoro estas pli atabla OL la ĵus emerita.  
 KION da paĝoj havas la libro KIUN mi devas legi!  
 La tago KIAM pluvos, tutcerte vi forgesos la parapluvon.  
 Mi dubas, KE via patrino povos veni ĝustatempe en la renkontiĝon.  
 La amiko pri KIU mi parolis al vi estas pli inteligenta OL mi.

Solvej:



— UMBERTO ECO sobre el Esperanto

“... He estudiado un poco todas esas utopías sobre la creación de una lengua perfecta o desde la lengua original, la lengua de Adán, hasta las lenguas llamadas universales como el esperanto, el volapuk y otras, que no pretenden ser lenguas perfectas sino lenguas auxiliares. Y con este motivo, incluso he estudiado la gramática del esperanto para comprender de qué se trata...

...Se trata de una lengua muy, muy bien hecha. Desde el punto de vista lingüístico, sigue en verdad unos criterios de economía y eficacia (lingüísticas) dignos de admiración.”

*De una entrevista en la radio Paris Première (27.febrero.1996)*

## Poezia Angulo

**PEDRO SALINAS** estis hispana poeto, apartenanta al la grupo de la Generacio de la jaro 1927, kie ankaŭ ariĝis aliaj kiel Federico García Lorca, Luis Cernuda, Gerardo Diego, Rafael Alberti, ktp. Sendube li estis unu el la plej imponaj poetoj dum la unua duono de la pasinta jarcento.

Pri li oni skribis, ke li estas la poeto de la amo, ĉar neniu kiel li estis kapabla priskribi la plenan ĝojon de la amaj sentoj. Post la hispana civila milito li ekziliigis en Usono, tie li mortis en la jaro 1951.



La valencia esperantisto Enric Baltasar ĵus tradukis kelkajn el la poemoj de Pedro Salinas kaj ni, fiere, publikigas ilin hodiaŭ.

### **POR LA VIVO MI NE VOLAS...**

Por la vivo mi ne volas  
insulojn, palacojn, turojn.  
Kiel pleja ĝojo alta:  
La vivo en la pronomoj !

Ekdemetu jam la vestojn  
la signojn kaj portretojn;  
mi ne tiel volas vin,  
vestita en aliulon,  
de io ĉiam filin'.

Vol' pri vi: libera, pura,  
en neredukteblo: vi.

Mi scias: kiam alvokos  
mi vin inter ĉiuj gentoj  
de la mondo,  
ja nure vi estos vi.  
Kaj onte al la demando  
pri la alvokant-idento,  
jen kiu vin lia volas,  
mi enterigos la nomojn,  
la surskribojn, historion.  
Mi rompanta estos ĉion  
kion al mi surĵetita  
eĉ antaŭ ol la naskiĝ'.  
Kaj denove nekonato  
eterna de senvestiĝo,  
de la petro, de la mondo,  
al vi dir?:  
"Mi vin amas, kaj jen mi".



## **SE MIN VI VOKUS, JES !**

Se min vi vokus, jes,  
se min vi vokus!

Forlasantus mi ĉion,  
Ĉion mi forĵetantus:  
la prezojn, la katalogojn,  
la bluon de l'oceano sur la mapoj,  
la tagojn kaj ties noktojn,  
l'antikvajn telegramojn  
kaj ankaŭ amon.

Vi, ja ne mia am',  
se mi vin vokus!

Atend' al via voĉo:

en la sub' teleskopoj,  
ekde la kosmaĵo,  
per speguloj, per tuneloj,  
per superjaroj ĝi  
eble venos. El kie mi ne scias.  
Per mirindaĵo, ĉiam.  
Ĉar se min vi vokos  
-se min vi vokus, jes, se min vi vokus!-  
okaz' per mirindaĵo,  
inkognite, sen vidi.

Neniam per la lipoj de mi kisataj,  
neniam  
per la voĉo kiu dirantas: "Ne foriru".



## ***Turismi en ... HIGUERA DE LA SIERRA*** **(Onubo)**

Higuera de la Sierra troviĝas ĝuste sur loko kie dum la romia imperio ekzistis kruciĝo en la vojoj inter la antikva Hispalis, la nuntempa Sevilo; Emerita Augusta, la nuntempa Merido kaj Pax Iulia, la aktuala portugala urbo Bejo. Tamen dum tiu epoko neniu grava urbo ekzistis sur tiu kruciĝo. La plej antikvaj informoj pri la nuntempa vilaĝo Higuera de la Sierra aperas dum la epoko kiam oni repopolis tiun zonon post la kristana konkero, dum la 13-a jarcento. Tiam oni alvenigis enloĝantojn el la nordo de la inbera duoninsulo. La elektata loko estis tie kie ekzistis gravaj akvo-fontoj kaj gastejo en la vojo inter la onubaj vilaĝoj Zufro kaj Araceno.

Fig-arboj ekzistantaj proksime al tiu gastejo estis la origino de la nomo de la nova vilaĝo *Higuera de la Sierra* en la hispana lingvo signifas "Siera Fig-arbo". Dum la 16-a jarcento la starigo de tri preĝejoj dividis la lokon laŭ tri zonoj: la alta kvartalo ĉirkaŭ la preĝejo de la Kristo de la Rozario; la centra kvartalo apud la paroĥejo de Sankta Sebastiano kaj la malalta kvartalo ĉirkaŭ la preĝejo de Sankta Antono.



Blazono de  
HIGUERA DE  
LA SIERRA

Tiutempe la vilaĝo ankoraŭ apartenis al la apudaj urboj Zufro kaj Araceno, ĝis kiam la reĝo Karolo la 5-a decidis la starigon de sendependa vilaĝo en la jaro 1553 kun la nomo *Higuera de la Sierra*. Post grava ekonomia krizo, provokanta grandan malpliigon de la enloĝantaro, terkulturaj reformoj adoptitaj dum la Klerisma reĝimo de la 18-a jarcento, favoris la kreskon de la urbon, kie tiame loĝis eĉ 1.700 homoj.

La franca invado de la Ibera Duoninsulo komence de la 19-a jarcento kaŭzis terurajn damaĝojn en ĉi tiu zono. Tamen dum la dua duono de la 19-a jarcento, la ekonomio de la vilaĝo prosperis, dank'al la korka industrio. Tiel, la plej gravaj kompanioj de Katalunio, Jerezo, Onubo kaj eĉ de la sudo de Francio uzis la korkojn de ĉi tiu zono por siaj vin-boteloj. Dum ĉi tiuj jaroj, kaj pro la ekonomia prospero, oni konstruis belajn domojn por tiuj kiuj enriĉiĝis dank'al la kork-industrio.

Dum la 20-a jarcento la hispana civila milito kaj la elmigrado okazinta en la tuta Andaluzio dum la 60-aj jaroj, malhelpis la evoluon kaj kreskon de la urbo, kiu suferis novan malpliigon de la enloĝantaro. Krome, dum la fino de la 20-a jarcento, la kork-industrio preskaŭ malaperis. Nuntempe la kampara turismo kaj la proksimaj arbaroj estas la nuntempa bazo de la ekonomio de Higuera de la Sierra.

### **Plej grava Monumento**



#### Preĝejo de Sankta Sebastiano.

Sur la loko kie stariĝis la antikva preĝejo de Sankta Sebastiano oni konstruis en la jaro 1746 novan preĝejon dediĉita al tiu kristana sanktulo. La preĝejo estas videbla ekzemplo de la religia arkitekturo de la onuba provinco de la 18-a jarcento.

Belegaj juveloj ene de la preĝejo estas la bildaroj troviĝantaj ene de ĉapeletoj kaj ĉefe la bildaro sur la ĉefaltaro.

### **Festoj**

- La Kavalkado de la Tri Reĝoj.

Komence de la jaro (la 5an de januaro) okazas la famega kavalkado de la Tri Reĝoj en Higuera de la Sierra. Ties ĉefa karakterizaĵo estas la fakto, ke la enloĝantoj de la vilaĝo reprezentas la

plej gravajn bibliajn scenojn de la naskiĝo de Jezuo. Post tiu de Sevilo, oni konsideras, ke ĝi estas la plej antikva kavalkado de la Tri Reĝoj en Hispanio.



Sceno de la Kavalkado de la Tri Reĝoj en Higuera de la Sierra

- La Festo de la Sangrio.

Kvankam Sankta Antonio estas memorata la 13-an de junio, en Higuera de la Sierra oni festas tiun tagon en aŭgusto, por faciligi la ĉeeston de tiuj kiuj laboras en la kamparo kaj ankaŭ de multaj turistoj. La plej populara agado dum ĉi tiu festo estas la ellaborado, kompreneble ankaŭ la trinkado, de la tipa trinkaĵo *Sangrio*, kiun en la vilaĝo oni ellaboras per blanka vino.

- La Festo de la Ciriales.

Dum la vespero de la 24-a de decembro, antaŭ la familiaj renkontiĝoj okaze de la kristnaska nokto, tipa festo en Higuera de la Sierra estas bruligi kandelojn surstrate.

### **Gastronomio**

La porko estas la bazo de la gastronomio en Higuera de la Sierra, tiel preskaŭ ĉiuj manĝaĵoj estas preparataj per tiu viando. Unu

el la plej tipaj estas la “*empaná higuereña*”, tio estas: pano kiu estas farçita per porkaĵo.

Dum la aŭtuna sezono aperas en la apudaj arbaroj multnombraj fungoj kaj kamp-asparagoj. Pere de ili oni ellaboras bongustajn omletojn.

*Venont-numere TURISMI EN ....*

*MONTORO (Kordovo)*

***Ĉu Vi deziras kunlabori kun la revuo?***

Ne hezitu sendi Viajn kunlaboraĵojn: artikolojn, desegnaĵojn, informojn, ludojn....

*Gazeto Andaluzia* estas la plej veterana esperanto-publikigaĵo en Andaluzio, tamen ĝi fariĝas tagon post tago kaj Via kunlaborado estas nepra.

Kontaktu kun: [esperanto14@ono.com](mailto:esperanto14@ono.com)



## Paĝoj pri Nia Historio

### *Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio*

***Alfredo Saralegui y Casellas.***  
*Angêlo de la almeriaj maristoj*

Sur pasinta numero de nia revuo ni jam parolis pri Serafín Baudín Agüero, tiu granada studento kiu lernis la internacian lingvon komence de la 20-a jarcento kiam li studis en la Universitato. Post fini siajn studojn li eklaboris kiel instruisto, unue en la jaena vilaĝo La Guardia, kie li senlace disvastigis esperanton. Lia dua laborposteno estis la urbo Almerio. Ĉi tie, ankaŭ kiel instruisto, li redaktis la revuon “*La Edukado*”, la unua bulteno en esperanto kiu fakis pri instruaj temoj



Alfredo Saralegui y Casellas  
1883 - 1962

En Almerio Serafín Baudín disvastigis kaj instruis la lingvon kaj samtempe li kontaktis kun tiuj almerianoj kiuj scipovis esperanton. Ĉi tiel, en la monato Septembro 1913, li sukcesis organizi la unuan oficialan grupon esperantistan en Almerio, kie li estis la unua prezidanto. Aliaj elstaraj membroj de la ĵus naskita grupo estis la prestiĝa almeria kuracisto Francisco Cordero Meca kaj la barelisto José Belmonte Bretones, unu el la ĉefaj reprezentantoj de la laborista movado en Almerio. La grupo ricevis kiel oficialan nomon *Grupo Esperantista Verda Stelo de Almerio*. Oni ekorganizis tiam elementan kurson de la internacia lingvo Esperanto, okazanta ĉe la strato Espejo 10, tie oni instruis la lingvon ĉiunokte de la 9-a ĝis la 10-a horo.

Sendube la kurso sukcesis ĉar, kelkaj monatoj post ties starigo, alvenis amase novaj membroj, baldaŭ oni organizis perfektigan kurson kaj oni disdonis oficiale diplomojn, informo kiu eĉ aperis sur la tiamaj almeriaj ĵurnaloj.

Kiel dirite, novaj membroj venis en la grupon post la okazigo de la unua elementa kurso, tiel en aprilo 1914 la ĝenerala asembleo de la Grupo Verda Stelo okazis kaj unu el la plej agemaj novaj membroj, Alfredo Saralegui, proponis novan nomon por la grupo, tio estis unuanime aprobita kaj tiel ekde la jaro 1914 la grupo nomiĝis *Kosmopolita Esperanto-Grupo de Almerio*. Tiu nomo ja sciigis pri la novaj celoj de la grupo, tio estas diskonigi la lingvon al almerianoj kaj al ĉiuj eksterlandoj loĝantaj tie, oni ne devas forgesi, ke Almerio havis tiam tre aktivan havenon.



La konstruo de la Sueza Kanalo kaj la eksportado de almeriaj fruktoj, ĉefe vinberoj, vivigis la almerian havenon dum la komenco de la 20-a jarcento.

Sur baldaŭa artikolo ni daŭrigos la sciigojn pri ĉi tiu almeria grupo, hodiaŭ la ĉefrolulo de nia historio estas tiu Alfredo Saralegui, mar-armea oficiro kiu, post lerni esperanton en unu el la kursoj

organizitaj de la Grupo Verda Stelo ĝis sia foriro el la andaluza urbo pro laboraj kialoj ja estis la kerno de la esperantismo en Almerio.

Alfredo Saralegui y Casellas naskiĝis en la galega urbo El Ferrol (Korunjo) en la jaro 1883. La familia tradicio devigis lin fariĝi arma maristo, lia patro estis marista oficiro kaj unu el siaj fratoj mortis en la milito en Kubo. Tamen, jam kiel knabo, li montris sian inklinon helpi la malriĉulojn, tiel apenaŭ 13-jaraĝa li fondis la asocion “*La Caridad*”, kies celo estis disdoni manĝaĵojn kaj medikamentojn al tiuj kiuj bezonis ilin.



Alfredo Saralegui  
en uniformo kiel mar-armea  
ofiro

En la jaro 1898 li ekigis siajn studojn kiel mar-armea oficiro en Lernejo de El Ferrol. En 1910 li rievis sian unuan postenon kiel oficiron en la haveno de Benidorm (Alakanto), tie li fondis kooperativon kie ariĝis la fiŝkaptistoj. Poste li iris en Bilbaon, tie denove li kreis asocion kun la celo protekti la mar-laboristojn. Estas necese memorigi, ke tiutempe fiŝkaptistoj ricevis nenian ŝtatan helpon eĉ ne pri sociala asekurado.

En 1914, jam kiel leŭtenanto de la Mar-Armeo, li okupis postenon kiel dua ĉefo de la Almeria Haveno.

En Almerio li kreis asocion por helpi la fiŝkaptistojn. Li okupis tiun postenon ĝis la jaro 1917 kaj li ĉiam estas memorata en la urbo Almerio kiel l’anĝelo de la fiŝkaptistoj, pro siaj grandaj laboroj en la helpo kaj sociala asekurigo de tiuj laboristoj.

Kiel dirite, en tiuj jaroj li lernis la internacian lingvon Esperanton kaj li aktive agadis en la tiea grupo, kiu dank’al lia propono

ricevis la nomon *Kosmopolita Esperanto-Grupo de Almerio*. Verdire li regis la lingvon, tiel tre baldaŭ li ricevis la peton de la grupo organizi kurson kaj esti la profesoro en la instruado al skoltistoj en Almerio. Same, li estis ekde la jaro 1915 reprezentanto en Almerio de la Levantena Esperanto-Federacio.


En la jaro 1917 Alfredo Saralegui ĉesis labori en Almerio kaj ricevis novan postenon en Madrido. Tie, li estis ĝenerala direktoro pri fiŝkaptado. Antaŭ la foriro li ricevis omaĝon en Almerio, li estis nomumita “Honora Civitano” de la urbo. En Madrido li kunlaboris en la organizado de scienca organizo: la Oceanografia Hispana Instituto kaj li ellaboris la unuan reglamenton kiu poste ebligis la fondiĝon de ŝtata instituto kiu helpus la fiŝkaptistojn. Nuntempe tiu organizo daŭre ekzistas kun la nomo “Instituto Social de la Marina” kaj ties ĉefa celo estas protekti tiujn laboristojn, la unua ĝenerala sekretario de tiu instituto estis Alfredo Saralegui.



La almeriaj fiŝkaptistoj ofte omaĝis al Alfredo Saralegui

Kiam komenciĝis la hispana civila milito Alfredo Saralegui estis en Madrido. En la jaro 1940 li rifuĝis en Valencio kaj la nova politika reĝimo ĉesis lin kaj eĉ nuligis lian nomumon kiel oficiron de la mar-armeo. La novaj aŭtoritatuloj sciis pri lia intereso protekti la laboristojn kaj ties viv-kondiĉojn, ĉi-kaze la fiŝkaptistoj, kaj pro tio oni akuzis lin pri aparteno al komunisma partio. Li estis enkarcerigata dum 4 jaroj. Post tiu kondamno li denove petis enirigi en la Ministerio pri Laboro kaj tiun peton oni akceptis. En la jaro 1946 li emeritiĝis.

Alfredo Saralegui forpasis en Madrido en la jaro 1962. Antaŭe oni renomumis lin denove oficiron de la Mar-armeo. En la jaro 2015, kiam la *Instituto Social de la Marina* festis sian 75-an datrevenon, la hispana Ministerio pri Laboro konsideris lin la oficialan fondinton de tiu laborista organizo.



Post peto de la fiŝkaptistoj de tiu zono,  
en la jaro 1927 tabulo omaĝas al S-ro. Saralegui  
en Fisterra (Galegio)

**aeu**

**Andaluzia Esperanto - Unuiĝo**

**Asociación Andaluza de Esperanto**



Kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo  
ĵus aperis nova fak-revuo en la internacia lingvo

## **V E N T O**

Veksilologia (flagscienco) revuo en esperanto.  
Rekte kaj senpage alirebla ĉe  
[www.esperanto.ac/vento](http://www.esperanto.ac/vento)

# FLAMENKO

## *La rumba*

Fine de la 19-a jarcento nova stilo eniris en la flamenkan arton: *la rumba*, miksaĵo inter la tradicia flamenko, la jam ekzistanta kuba rumba kaj la amerika guaraĉo. La nova stilo disvastiĝis unuafoje per la flamenkaj teatroj kiuj vizitis ĉiujn urbojn kaj vilaĝojn okaze de la someraj foiroj.

La rumba estas diboĉa kanto, iom simila al la tango kaj al la bulerio. La stilo estas plena je energio, pazio kaj viveco. Se temas pri gitar-ludado la sonoj estas emfazaj, ripetitaj kaj fortaj. Rilate la kantadon, ĝi povas esti ludata de viro kaj de virinoj kaj la plej oftaj muzikiloj akompanantaj la rumbon estas la flamenka gitaro mem, la kastanjetoj kaj ekde la 80-a jardeko la frapskatolo.



Paco de Lucía estis unu el la plej lertaj gitar-ludistoj en la rumba stilo. Lia ne-forgesebla “Inter du akvoj” estas majstro-verko en la flamenka arto.

Aŭskultebla ĉe  
<https://www.youtube.com/watch?v=2oyhld64-s>

Dum la 60-jardeko de la pasinta jarcento, ĉe la cigana komunumo de Katalunio aperis la tiel nomata *Kataluna Rumba*, kies ritmoj estas miksaĵo inter la flamenka rumba, la kubaj rumboj kaj eĉ la rokenrolo. Ne nur la gitaro akompanas la ritmon de la katalunaj rumboj, sed ankaŭ la piano, la timbaloj kaj la bas-gitaro.

Rumbo de la Korb-faristo

Korb-faristo, korb-faristo, korb-faristo.  
Cigana korb-faristo mia ruino estas vi.  
Cigana korb-faristo, vi estas mia dolor'.  
Cigana korb-faristo, venu tuj apud mi.  
Cigana korb-faristo, poste vi iru jam for.

Por familioj malamikoj ni devas esti  
Tiun kulpon mi ne eltenas  
Se vi min amas, venu tuj apud mi  
Jen nia futuro, ĝi al ni du apartenas.

Mi ne kulpas pro nia amo  
Jen la destino por ni du  
Forgesu baldaŭ la tristan paseon  
Prenu la tempon por ni nun.

Ne ekzistas solvantaj rimedoj  
Kiuj mildigos nian doloron  
Se vi min amas, venu tuj apud mi.  
Ni forviŝos nian angoron.

Mi ne kulpas pro nia amo  
Jen la destino por ni du  
Forgesu baldaŭ la tristan paseon  
Prenu la tempon por ni nun.





## Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

### La kontraŭ-tuberkuloza hospitalo de Alfaguara en Granado

Sur la montaro *Alfaguara*, apud la vilaĝo *Alfacar* en Granado troviĝas neglektita hospitalo por tuberkulozuloj fondita de la germana Bertha Wilhelmi en la jaro 1923. Bertha Wilhelmi naskiĝis en Germanio en la jaro 1858 ĉe riĉa familio. Ŝia patro, Fernando Wilhelmi venis en Granadon por konstrui paper-fabrikon. Bertha havis fraton, Luis, kiu estis tre amata al ŝi. Li mortis pro tuberkuloza malsano. Post la morto de la knabo, kiam Bertha estis 12-jaraĝa ankaŭ ŝi venis en Hispanion. En la jaro 1923, memore al sia frato ŝi decidis konstrui hospitalon por tuberkulozuloj ĉe trankvila kaj freŝa etoso. Bertha Wilhelmi forpasis en la jaro 1931, nuntempe strato en Granado memorigas ĉi tiun bonfaran sinjorinon.



La hospitalo, kvankam ruinigita, ankoraŭ stariĝas ĉe la montaro *Alfaguara*.

De antaŭ kelkaj jaroj ĉi tiu hospitalo, hodiaŭ preskaŭ detruita, estas loko konata pro misteraj okazintaĵoj. Fakulo pri parapsikologiaj fenomenoj vizitis la lokon kaj fotografiis abunde ĉiujn angulojn de la

neglektita hospitalo. Laŭ li, estas apenaŭ videblaj sur kelkaj fotografaĵoj virino en nigra vestaĵo kun kitelo akompanita de knabo. Ankaŭ aperas alta homo en nigra vestaĵo kaj apud li kelkaj hundoj.

La fakulo kontaktis kun unu el la lastaj pacientoj de la hospitalo, tiam infano kun seka pleŭrito kaj hodiaŭ plenaĝa homo. Laŭ li sciigis, la alta homo en nigra vestaĵo povus esti la jezuita pastro kiu priatentis la hospitalon kiu posedis kelkajn hundojn ĉiam akompanantaj lin. Rilate la virinon kaj la infanon, la eks-paciento de la hospitalo rakontis, ke ŝi povus esti Elena Bickmann, bona amiko de la fondinto de la hospitalo kiu okupiĝis pri la loko post la forpaso de la fondintino. Ŝi ĉiam vestis en nigraj vestaĵoj kaj sur ili ŝi uzis kitelon.

Kiam ekiĝis la hispana civila milito ŝi decidis reiri en Germanion, post la fino de la milito en Hispanio ŝi venis denove ĉi tien por refunkciigi ĝin. Ĉe la land-limo en Germanio la aŭtoritatuloj permesis al ŝi foriri el Germanio, tamen tute ne rilate ŝian knabon, kiu unue devus plenumi siajn militajn devojn en tiu militema Germanio. Elena Bickmann kaj ŝia filo decidis renkontiĝi en Granado kiam la germana ŝtato akceptos la eliron de la knabo, tamen, verŝajne, tiu renkontiĝo neniam okazis.




Bertha Vilhelmi, fondinto de la kontraŭ-tuberkolza hospitalo en Granado.

Heilbronn (Germanio) 1858.

Granado 1934.

Hodiaŭ la hospitalo estas tute neglektita. Ĝi troviĝas meze de pin-arbaro en *Alfaguara*, tie du grandaj cipres-arboj gardas la enirejon de la hospitalo kaj post ili nur sentiĝas speciala silento kaj peza kvieteco.

## Nuda Krucvortenigmo



### *HORIZONTALALE*

- A. Konsonanto aperanta en la vorto konsonanto.
- B. Fare de.
- C. En akuzativa formo, ekstrema kaj artikigita parto de la brako de homo.
- Ĉ. Plurale, parto de ĉeko kiu restas en la registro.
- D. Inverse, senmovige ĉirkaŭvolvi.
- E. Morfemo montranta nedifinitan, sed plej ofte, malgrandan kvanton.
- F. En la japanaj aŭtomobiloj.

*VERTIKALE*


1. En la tajlandaj aŭtomobiloj.
2. Inverse, en iu tute nedifinita tempo.
3. Duoble aŭ pluroble fleksi tukon aŭ paperon.
4. Plurale, pafilego.
5. Inverse kaj sen la lasta vokalo, la pli malgranda el du aferoj.
6. Sen la lasta vokalo, antaŭe ne ekzistanta.
7. Konsonanto utila por la pluraloj.

**Rebuso**

Se Vi atente legas la nomojn de la bestoj supre aperantaj, Vi devas diveni la nomon de fama usona filmo de la jaro 1999.

Pri kiu filmo temas ? Respondo: \_\_\_\_\_.

## Solvo al la pasintnumera Nuda Krucvortenigmo.



## Solvo al la pasintnumera Rebuso.

Kie Vi somerumos ? : Ĉe valo en Italio.

Sur la bildo aperis: Ĉevalo kaj Talio ene de litero I.

Do... Ĉevalo / En I Talio → Ĉe valo en Italio.

Ĉu la revuo plaĉas al Vi? Ĉu Vi ŝanĝus ion?

Ĉu io aldonebla? Ĉu forviŝi ion?

Komentu kaj proponu per jena kontaktilo:

esperanto14@ono.com



## HUMURO



La numero 110-a de nia revuo aperos komence de la monato februaro 2019. Ni dankas Vian kunlaboradon, ĉar la eldonado de revuo nur estas ebla se ni ĉiuj kunlaboras. DANKON !

esperanto14@ono.com

GAZETO ANDALUZIA  
Apartado de Correos 3142  
14080 CÓRDOBA (Andaluzio – Hispanio)

**Andaluzia Esperanto-Unuiĝo**  
**Asociación Andaluza de Esperanto**



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.

Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López  
Vicprezidantino: Fátima Jiménez García  
Sekretario: José María Rodríguez Hernández  
Kasistino: María Dolores Torres Mateo  
Voĉdonantoj: Jordi Lietor López  
Antonio Rodríguez Gasch  
Juan García del Río

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: [angelarquillos@gmail.com](mailto:angelarquillos@gmail.com)  
[esperanto14@ono.com](mailto:esperanto14@ono.com)

TTT-paĝo: [www.esperanto.ac](http://www.esperanto.ac)

[www.esperanto-andalucia.info](http://www.esperanto-andalucia.info)

Blogo: [www.andaluciaesperanto.blogspot.com](http://www.andaluciaesperanto.blogspot.com)

Aliaj utilaj adresoj de la Esperanto-Movado

\* Universala Esperanto-Asocio  
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)  
[uea@inter.nl.net](mailto:uea@inter.nl.net)

\* Hispana Esperanto-Federacio  
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)  
[admin@esperanto-es.net](mailto:admin@esperanto-es.net)



**ALIĜILO** por la  
**78-a Hispana Esperanto-kongreso**  
 01-a ĝis 05-a de majo 2019  
**Malago, Hispanio**

Ĉiu partoprenanto bonvolu plenigi kaj sendi apartan aliĝilon al retadreso:  
**ifef2019@esperanto-andalucia.info**  
**marilo1950@hotmail.es**

**LKK- adreso:**

Andaluzia Esperanto Unuiĝo  
 strato Ānfora, 6-5° D, 29013-Malago (Hispanio)

**Kongresa ret-paĝo:** <https://esperanto-andalucia.info>

Familia nomo		Persona nomo	
Adreso		Ret-adreso:	
Telefono:		HEF-AEU-ano :   jes    ne           viro    virino           (forigu ne taŭgajn)	
<b>Mi antaŭpagas jenan sumon :</b>		<b>Eŭro</b>	
Per: ĝiro IBAN: ES57 2038 9814 83 6000595212 SWIFT/BIC: CAHMESMM			
<b>Kotizoj en Eŭro</b>	<b>Ĝis 31.12.18</b>	<b>Poste</b>	<b>Sumo</b>
A) HEF aŭ AEU-membro	35	55	
B) Ne membro	50	65	
C) Juna (1) membro de HEF, AEU kaj familiano	20	35	
D) Juna (1) nemembro, familiano	25	45	
E) Infano kaj studento ĝis 24 jaraĝa	5	5	
Ĉambro-perado po persono	5	5	
<b>V1:</b> Urbovizitado – <b>Malago</b> (piedire)	3	3	
<b>V2:</b> Urbovizitado – <b>Malago, Botanika ĝardeno</b> , per buso	8	8	
<b>D1:</b> Duontaga ekskurso: <b>Zafarraya</b> , kun faka vizito	15	15	
<b>D2:</b> Duontaga ekskurso: <b>Antequera</b>	12	12	
<b>T1:</b> Tuttaga ekskurso, kun tagmanĝo (pikniko): <b>Ronda</b> (*)	25	25	
<b>T2:</b> Tuttaga ekskurso, kun tagmanĝo (pikniko): <b>Kordovo</b> (*)	30	30	
<b>A1:</b> Tuttaga ekskurso, kun tagmanĝo (pikniko): <b>Granado</b> (*)	42	42	
Tranoktado laŭ ĉambro mendilo (minimume unu nokto)			
Aldonaj punktoj post la 5-a de majo (5€/nokte)			
<b>Postkongreso: Norda Maroko (**)</b>	unulita ĉ.	dulita ĉ.	
Vendredo, 10.05 Malaga-Algeciras-Ceuta-Tetuan	255	225	
Sabato, 11.05 Tetuan-Asilah-Tanger-Tetuan			
Dimanĉo, 12.05 Tetuan-Chaouen-Ceuta-Malaga			
<b>Je aliĝo devas pagi: kongreskotizon, ĉambroperadon kaj tranoktadon laŭ elekto por minimume unu nokto. (+50% postkongreso kaze de ĝia rezervo). (**) Prioritaton por postkongreso havas la IFEF-kongresanoj. Signu la elektitajn servojn</b>			
Entute :			
Pagita sumo :			
Restanta pago :			

(\*) Pikniko inkluzivita kaze de kompleta pensio, alie devas esti aparte mendita.